Alicio tuj ekkuris en la direkto al kiu ĝi montris. Pro timo de ĝia kolero ŝi eĉ ne provis klarigi ke ŝi ne estas Mariano.

"Li ja kredas ke mi estas lia ĉambristino" ŝi al si diris, kurante. "Kia surprizego estos por li eltrovi kiu mi estas! Sed bone estos alporti al li la ventumilon kaj gantojn, t.e. se prosperos al mi trovi ilin."

Dirante tion, ŝi trovis sin staranta antaŭ ĉarma malgranda dometo kun sur la pordo neta nom-tabulo kaj gravurita sur ĝi la nomo Sro. B. Kuniklo. Ŝi eniris, ne frapinte la pordon, kaj rapidis supren per ŝtuparo timante ke ŝi renkontiĝos kun la efektiva Mariano, kaj estos forigita el la domo antaŭ ol ŝi povos trovi la ventumilon kaj gantojn.

"Kiel strange estas" diris Alicio al si "esti ĉirkaŭsendata de Kuniklo! Eble ankaŭ *Dajna* igos min porti por ŝi depeŝojn. Jen kio povus okazi. 'Fraŭlino Alicio, venu, pretigu vin por la promeno.' 'Post unu momento, varnjo; tamen ĝis *Dajna* revenos, mi devas gardi la mustruon, por ke la muso ne eliru.' Sed mi kredas ke, se *Dajna* komencus tiamaniere estri la domanojn, oni ne permesus al ŝi resti en la domo."

Dum ŝi parolis, si trovis sin en neta ĉambreto kiu havis tablon apud la fenestro, kaj jen sur la tablo (kion ŝi esperis trovi) ventumilo kaj



kelkaj paroj da blankaj ganteto
ventumilon kaj unu paron da ga
forlasonta la ĉambron kiam oka
starantan apud la spegulo, b
boteleto *ne* havis surskribon
TRINKU MIN, tamen ŝi malŝt
ĝin al la lipoj "Kiam ajn mi
trinkas ĉi tie funde, nepre okaza
mi volas provi kian efikon havos
Mi tre esperas ke ĝi denove gra
mi vere enuas esti tia malgran
mi estas."

Kaj tian efikon ĝi fakte havis,
tujan; ĉar antaŭ ol ŝi eltrinkis
enhavo, ŝi sentis la kapon prem
plafono, kaj devis klini la dors
rompu al si la kolon. Si tuj d
leton dirante: "Sufiĉas! mi es
kreskos plu. Jam mi ne povas e
Ho, mi tre volas ke mi ne tiom t

Ho, ve! Jam tro malfrue est
La kresko tute *ne* ĉesis, sed
devis stari sur la genuoj, kaj p
eĉ por tio mankis spaco. Ŝi kl
la planko havante unu kubut
pordo kaj la alian klinitan ĉ
Sed ankoraŭ plu ŝi kreskis, kaj
rimedo—ŝi ŝovis unu brakon el
unu piedon en la kamentubon,

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEI